

Jezuitoj

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo en Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto Asocio,
la 14-an de septembro 2016

Enkonduko

Kiam mi dum socialismo estis lernanto de baza lernejo (1968), en mia lernolibro de historio jezuitoj estis bildigitaj kiel fanatikaj barbaroj, kiuj nur bruligas ĉeĥlingvajn librojn. En la lernolibro ĝiaj aŭtoroj skribis pri la jezuitoj laŭvorte: „*La slogano „celo sanktigas rimedojn“ senmoraligis iliajn karakterojn, tial ili en futuro ne hezitis fari la plej malbonajn agojn.*“

Karel Havlíček Borovský (1821-1856) en sia epigramo apartenigas la jezuitojn inter malamikojn de ĉeĥlingvaj libroj:

Českých knížek hubitelé líti: Ĉeĥaj libroj havas ardajn malamikojn:
plesnivina, moli, jezoviti. ŝimon, tineolojn, jezuitojn.

Ĉeĥa verkisto **Alois Jirásek** (1851-1930) en sia romano „Mallumo“ („Temno“, 1913) detale priskribis „jezuitan teroron“, serĉadon kaj publikan bruligadon de malpermesitaj ĉeĥaj libroj. La jezuitoj en la romano ofte estas prezentitaj kiel malbonaj, nesimpatiaj homoj.

Bedaŭrinde ne nur mi devis tion lerni. En la jaro 1989 socialismo en mia lando finiĝis, sed antaŭjuĝoj kontraŭ la jezuitoj (kaj ĝenerale kontraŭ kristanoj) en nia socio transdaŭras. Homoj, kiuj nur malmulte scias pri ekleziaj ordenoj, akuzas la jezuitojn eĉ pri inkvizicio kaj brulmortigado de homoj. Mitoj, ke la jezuitoj malamamis ĉeĥe parolantajn homojn kaj estis invititaj de Habsburgoj, por ke helpu al ili germanigi niajn naciojn, estas ĝenerale disvastigitaj.

Fondado de jezuita ordeno

La jezuitoj estas romkatolika monaĥa ordeno, kiun fondis hispana eŭsko **Ignaco Lojola (Íñigo López de Loyola, 1491-1556)**. Li devenis el nobela eŭska familio, estis reĝa paĝo, fariĝis oficiro de hispana armeo de **Karolo la 5-a**. En la jaro 1521 francoj atakis Navaran Princujon en nuna norda Hispanio. Dum nesukcesa defendo de la burgo Pamplona, la 21-an de majo 1521, paflega kuglo vundis piedon de Lojola. Junan vunditan nobelon flegis malamikoj, francaj konkerintoj de la burgo. Li estis transportita hejmen kaj operaciita. En mezepokaj kondiĉoj, kiam unusola anesteziilo estadis egaj dozoj da alkoholo, tiamaj kuracistoj sciis nenion pri sterileco kaj antibiotikoj ne ekzistis, estis miraklo, ke Lojola la operacion transvivis. Sed unu lia piedo restis pli mallonga ol la alia. Kuŝante hejme Lojola legis religian literaturon. Same kiel Saŭlo fariĝis apostolo Paŭlo (Agoj 9, 1-30; 13, 9), eksa soldato Lojola fariĝis batalanto de la Dio. Li vidis, ke kristana eklezio estas splitita kaj reformitaj eklezioj tre plimultiĝis. Li pensis pri katolika eklezio kaj pripensis novan monaĥan ordenon,

kiu povus esti pli perfekta ol ĝistiamaj ordenoj. Post resaniĝo li fariĝis ermito en kavo ĉe la urbeto Manresa, studis filozofion kaj teologion. Intence li volis labori kiel misiisto inter islamanoj, sed kaŭze de militoj kontraŭ ili tio ne estis ebla. En la jaro 1534 Ignaco Lojola ofertis siajn servicojn al papo **Paŭlo la 3-a**. La 27-an de septembro 1540 la papo novan ordenon aprobis per la buleo „Administrado de batalanta eklezio“ (latine: „Regimini militantis Ecclesiae“). Slogano de la jezuitoj fariĝis la sentenco „Ĉio por pli granda gloro de la Dio“ („Omnia ad maiorem Dei gloriam“). Literoj „IHS“, kiujn oni povas legi en preĝejoj kaj domoj, kiujn posedis la jezuitoj signifas „Jesuo – savanto de homaro“ („Jesus Hominum Salvator“). Ignaco Lojola restis en Romo kiel la unua dumviva generalo de la ordeno, aliaj jezuitoj laboris en diversaj katolikaj landoj. Por nova ordeno Lojola verkis „Konstitucion de Societo de Jesuo“ („Constitutiones Societatis Iesu“, 1552). Ordenestro estis elektita generalo (praepositus generalis – ĝenerala estro). Sub li estis monaĥejestroj (superioroj de la ordeno) kaj provincestroj (provincialoj). En la jaro 1556, kiam Ignaco Lojola mortis, la ordeno jam havis 1 000 membrojn.

Ignaco Lojola estis sanktigita en la jaro 1622. Sankta Ignaco Lojola estas bildigita kun libro, kiu estas ornamita per la literoj AMDG (Ad maiorem Dei Gloriam), brulanta koro kaj tri najloj de la kruco, sur kiu mortis Jesuo Kristo.

Inkvizicio, brulmortigado kaj la jezuitoj

Vorto inkvizicio devenas el latina verbo „inquare“ („trovi la veron“). Tio signifas „trovi la veron pri fido kaj moroj“ de iu ajn kristano. La inkvizicio eklaboris en la 13-a jarcento kaj estis domeno de almozordenoj – dominikanoj kaj franciskanoj. La jezuitoj en laboro de inkvizicio ne partoprenadis. Eĉ fondanto de jezuita ordeno Ignaco Lojola en la jaro 1528 estis ekzaminata de la inkvizicio kaj 42 tagojn malliberigita en inkvizicia malliberejo en Salamanca. Tio signifas, ke la jezuitoj ne havis emon partoprenadi en inkvizicia laboro.

Ankaŭ brulmortigado de homoj ne estis jezuita invento. Ekde ekesto de eklezio multe da homoj serĉis la veron, fordirektis de oficiala linio kaj fariĝis herezuloj. Sed la eklezio nur admonis ilin. La unua brulmortigado en Eŭropo okazis nur en la 13-a jarcento. En Bohemio la unua brulmortigado de homo okazis jam en la 14-a jarcento (1316), kiam jezuita ordeno ankoraŭ ne ekzistis. Krom tio ne nur katolikoj, sed ankaŭ nekatolikoj brulmortigadis homojn. Husanoj same kiel iliaj malamikoj brulmortigadis. Eĉ grandaj reformistoj de la eklezio, **Martin Luther** (1483 -1546) kaj **Johano Kalvin** (1509 -1564) estis fervoraj ĉasantoj de sorĉistinoj, kiuj post turmento kaj „juĝo“ mortis en flamoj. La jezuitoj, mezepokaj kristanoj, la brulmortigadon bontrovis, sed ne brulmortigadis.

Jezuitoj kaj virinoj

Ignaco Lojola estis ĉarma viro, tial multe da virinoj volis al li proksimiĝi, sed Societo de Jesuo estis monaĥa ordeno. Unusola virino, kiu kaŝe apartenis al la ordeno, estis **Johana la Hispana** (1535-1573), amikino de Lojola, kiu fariĝis portugala reĝino kaj multe al jezuitoj helpadis.

Kiel oni povis fariĝi jezuito

La jezuitoj defendis precipe interesojn de la papo. En aliaj monaĥaj ordenoj monaĥoj adeptoj promesis spiritan purecon, modeston kaj obeemon, sed la jezuitoj promesis ankaŭ disciplinon al la papo (videbla reprezentanto de la Dio sur la tero).

La jezuitoj en sian ordenon neniun alogis. Ne ĉiu kapablis fariĝi jezuito. Interesato povis resti en la ordeno dek tagojn. Se ordena reĝimo al li ne plaĉis, li povis libere foriri. Se li volis resti, li fariĝis adepto kaj studis du jarojn. Taga reĝimo de studentoj estis strikte planita unu horo post la alia, tage kaj nokte. En la ordeno estis eĉ pli granda disciplino ol en tiamaj armeoj. Jezuitaj studentoj povis promeni en duopoj, estro decidis, kiu kun kiu promenos. Ĉiu devis meldi transpaŝon kontraŭ disciplino aŭ kredo. Sed tiu edukado ne estis nur strikta. Neniu povus elteni nur tiel striktan edukadon. La jezuitoj samtempe donis al studentoj feliĉon kaj senton de hejmo en la ordeno. Post du jaroj la studentoj povis studi 3 jarojn filozofion, 6 jarojn instrui kaj poste kontinuus studi 4 jarojn teologion.

Por homoj, kiuj ne volis fariĝi jezuitoj, oni planis 4-5-jaran studadon (matematiko, latina lingvo kaj aliaj disciplinoj), poste studadojn de filozofio (3 jaroj) kaj teologio (4 jaroj). La jezuitoj estis pedagogaj korifeoj, tial en jezuitaj lernejoj studis eĉ filoj de nekatolikoj.

Danke al tiu postulemeo la jezuitoj estis bonegaj pedagogoj. Ili estis tre edukitaj, modestaj, laboremaj kaj agemaj. Jezuito devis helpi al si mem en ĉiu situacio. Pro tio ni ĝis nun havas proverbon „ruza kiel jezuito“.

La jezuitoj la sloganon „celo sanktigas rimedojn“ ne uzadis

Jezuita ordeno estis fondita en la jaro 1534. La sloganon „celo sanktigas rimedojn“ uzis unuafoje itala verkisto **Nicolò Machiavelli** (1469-1527) en sia libro „Reganto“ en la jaro 1532, antaŭ fondado de jezuita ordeno (1534). La jezuitoj tiun sloganon neniam uzadis.

Alveno de la jezuitoj en niajn landojn

En la jaro 1556 imperiestro **Ferdinando la 1-a** invitis germanajn kaj italajn jezuitojn en Pragon. La 21-an de aprilo 1556 grupo de 12 jezuitoj alvenis kaj setliĝis en la universitato Klementino. En la jaro 1562 ili povis fondi kvinklasan lernejon, sed ankaŭ filozofan kaj teologan fakultatojn. Ekde la sama jaro ili povis cenzuri librojn.

En la jaro 1566 la ordeno setliĝis en Olomouc.

En la jaro 1572 aperigis tri jezuitoj (**Alexander Höller, Bernard Brant, Jakub Schermer**) en Brno.

Patriotaj jezuitoj

La jezuitoj en ĉiu lando edukis novajn jezuitojn, kiuj perfekte parolis lokan lingvon. Indiĝenaj jezuitoj tial estis lokaj patriotoj.

En la jaro 1645 granda sveda armeo (28 000 soldatoj) de **Lennart Torstenson** (1603-1651) volis konkeri la urbon. Bataloj daŭris ekde la 3-an de majo ĝis la 23-an de aŭgusto 1645. La urbon defendis nur 1 500 viroj. Veraj soldatoj estis nur 500 (unu triono el ili). Danke al bonega kunlaboro de militestro **Jean Louis Raduit de Souches** (1608-1682), kiu komandis defendantojn, kaj jezuita teologo kaj historiisto **Martin Středa** (1587-1649), kiu organizis arieron de la defendantoj, svedoj la urbon neniam konkeris.

Kiam en la jaro 1648 finiĝis 30-jara milito, en Prago oni ankoraŭ batalis, ĉar neniu sciis, ke jam estas paco. Nova urbo kun kvartalo Malá Strana estis okupita de sveda armeo subgvide generalo **Jan Krištof von Königsmark** (1600-1663), eksa imperiestra oficiro. Praganoj defendis Malnovan urbo (Staré Město). Tiam batalis ĉiuj, kiuj kapablis batali. Inter defendantoj estis ankaŭ studentoj. Komandanto de studenta legio, kiu brave defendis ĉefurbon, estis jezuito **Jiří Plachý** (ĉirkaŭ 1606-1664), altstatura viro (194 cm). Svedon centron de Prago ne konkeris.

En la jaro 1680, kiam en Prago furiosis pesta epidemio, la jezuitoj volonte zorgis pri malsanuloj. El 25 jezuitoj transvivis la epidemin nur unu, aliaj infektiĝis kaj mortis. En Kutná Hora havis la saman sorton jezuita verkisto kaj poeto **Bedřich Bridel** (1619-1680).

La jezuito **Bohuslav Balbín** (1621-1688) estis instruisto kaj historiisto. Liaj plej famaj libroj estas „Defendo de slava lingvo, precipe ĉeĥa lingvo“ („Dissertacio apologetica pro lingua Slavonica, praecipue Bohemica“) kaj „Varioj el historio de Bohemia Regno“ („Miscellanea historica Regni Bohemiae“). En la „Defendo“ Balbín montras, ke ĉion, kion oni povas diri germane, oni povas diri ankaŭ ĉeĥe kaj ke germana lingvo enhavas grandan amason da vortoj, kiuj devenas el latina lingvo.

Malamikoj de la jezuitoj ankaŭ diradas, ke la jezuitoj estis alvokitaj post batalo sur Blanka Monto (1620), por ke helpu al Habsburgoj germanigi ĉeĥan popolon. La jezuitoj alvenis jam en la 16-a jarcento (Prago 1556, Olomouc 1566, Brno 1572) antaŭ batalo sur Blanka Monto, kiu okazis la 8-an de novembro 1620. Dum kontraŭhabsburga ribelo, kiu en Prago komencis la 23-an de majo 1618 per trafenestrigo de habsburgaj katolikaj oficistoj, la jezuitoj estis forpelitaj, sed en la jaroj 1620-1621 ili revenis.

Germane parolantaj homoj loĝis kune kun ĉeĥoj, moravianoj kaj silezianoj ekde mezepoko. Precipe Primislidoj en la 13-a jarcento invitis en niajn landojn germanajn kolonistojn. En la 16-a jarcento multe da ĉeĥe parolantaj nobeloj al esterlandanoj, kiuj parolis germane, france, hispane, itale, hungare k. a. Germanizadon realigis precipe **Jozefo la 2-a Habsburga** (1741-1790), kiu volis krei fortan ŝtaton kun unu oficiala lingvo.

La jezuitoj volis atingi animojn de ĉeĥe parolantaj homoj. Pro tio ili edukis multe da ĉeĥe parolantaj jezuitoj. Ilia merito pri nuna literatura lingvo estas grandega.

Se ni parolas pri germanizado, ni devas ekkonscii, ke nun okazas eĉ pli granda germanizado ol en mezepoko, ĉar angla lingvo apartenas al germanaj lingvoj.

La jezuitoj kaj teatro

Post 30-jara milito la jezuitoj celis influi animojn de homoj, kiuj estis nek herezuloj nek ateistoj, sed nur malfeliĉaj viktimoj de la milito, la homoj, kiuj kaŭze de militaj suferoj estis needukitaj kaj anime apatiaj. La jezuitoj estis bonegaj psihologoj. Se ili volis impresigi animojn de homoj, inklinigi ilin al sia flanko, ili aranĝis grandiozajn procesiojn, solenojn kaj teatrajn ludojn. Ĉiu jezuita instruisto devis dum la jaro malpleje unufoje dum la jaro prepari teatran spektaklon, en kiu ludis liaj lernantoj. Ne ĉiu teatra ludo akiris nivelon de teatraĵoj de Shakespeare, sed efiko estis granda. Krom tio multe da infanoj ne konzumis la programon, sed aktorin. La unuaj teatraj ludoj temis pri obstina pekanto, kiu mortas sen absolvo, prodiga filo, la ludoj, en kiu ĉefa heroo decidiĝas inter bona kaj malbona vojo. Poste aperigis perfida ambiciulo, dramoj el geedza vivo, rilatoj inter gefratoj.

La jezuitoj kaj libroj

La jezuitoj estis edukitaj homoj, kiuj eldonis librojn. En praga Klementino ili eldonis multe da libroj. La jezuitoj eldonis eĉ libron de nekatoliko **Jan Ámos Komenský** (1592-1670) „Malfermita pordego de lingvoj“ („Ianua linvarum reserrata“).

Se ili dum misioj trovis libron, kiu ne estis laŭ ilia opinio utila aŭ estis malbona, ili ĝin konfiskis. La jezuito **Antonín Koniáš** (1691-1760), estis aŭtoro de listo de malpermesitaj libroj, kiu enhavis 1 233 titolojn de ĉeĥaj libroj, sed ankaŭ de francaj kaj germanaj librojn („Determinilo por malfermo de herezoj por ekkono kaj fermo por eradikado“, 1729). Li estis fanatiko, kiu publike bruligis multe da libroj. Sed eĉ liaj estroj pro tio lin strikte admonis. El 30 000 libroj, kiujn Koniáš konfiskis, nur kvarono estis ĉeĥlingvaj. Krom tio fanatiko Koniáš estis nur escepto. Aliaj jezuitoj en konfiskitaj libroj nur korektis fragmentojn, kiuj laŭ ilia opinio kontraŭdiris al katolika vidpunkto, kaj korektitan libron redonis al posedanto. Ili ankaŭ ofte disdonis inter homoj katolikajn librojn. Krom tio ili po du ekzempleroj de ĉiu titolo de konfiskitaj libroj kolektis en fermitajn bibliotekoj. Danke al preciza laboro de la jezuitoj, nuntempaj sciencistoj povas studi tiamajn librojn. Inter konfiskitaj libroj estis multe da nekvalitaj libroj, butikistaj kantoj kaj pornografio. La jezuitoj ofte disdonis proprajn eldonaĵojn inter homoj.

Nekatolikoj ankaŭ bruligis librojn, ne tiel ofte kiel katolikoj, sed krom tio estis ikonorompistoj (ekzemple dum kontraŭhabsburga ribelo en la jaro 1618 nekatolikoj senornamigis Katedralon de Sankta Vito en Prago).

La jezuito **Jiří Plachý-Ferus** (ĉirkaŭ 1586-1655), rilato de altstatura Jiří Plachý, estis direktoro de biblioteko en Klementinum kaj presejo, sukcesa aŭtoro de pli ol 80 libroj. En la jaro 1638 Jiří Plachý-Ferus eldonis sian libron „Ora ŝlosilo al ĉielo“ („Zlatý nebeklič“). Ĝi estis kateĥismo kaj breviero, verkita per bona ĉeĥa lingvo. Ĝis la jaro 1889 la libro estis 237-foje eldonita.

La jezuito **Matěj Václav Šteyer** (1630-1692) estis laborema kolektanto de religiaj kantoj. En la jaro 1683 li eldonis „Ĉeĥan Kantaron“ („Kancionál český“), la plej faman barokan kantaron. La kantojn el la „Ĉeĥa Kantaro“ oni ĝis nun kantas dum romkatolikaj diservoj.

Jezuitaj misiistoj

Samklasano de Ignaco Lojola, la jezuito **Francisko Ksaver** (1505-1552), fariĝis misiisto en Japanio. Sed ankaŭ multe da aliaj jezuitoj volis labori en misioj. La jezuitoj neniu devigis labori en la misioj. Ili ne volis sendi en la misiojn homojn, kiuj estis psiĥike labilaj, malsanaj aŭ fanatikoj, kiuj volis nur morti kie martiroj. Simple dirite, sukcesa vivanta jezuito estis por celoj de la ordeno pli utila ol morta martiro. Interesatoj pri laboro en la misioj ofte devis longtempe atendi permeson labori en la misioj. Antaŭ foriro la interesatoj devis esti bone preparitaj, scii indiĝena(j)n lingvo(j)n.

Pastro, sciencisto, lingvisto kaj pedagogo **Josef Dobrovský** (1753-1829) volis studi teologion kaj labori kiel jezuita misiisto en Indio, sed jezuita ordeno estis post unu jaro (1773) abolicita. Tial Dobrovský finigis sian studadon en Prago.

La jezuito **Jiří Josef Kamel** (1661-1706) estis apotekaristo en Brno, sed poste sukcesa misiisto en Filipinoj. Li estis aŭtoro de libro pri plantoj de la insulo Luzon en Filipinoj („Herbarium aliarumque stirpium in insula Luzone philippinarum“). Sveda natursciencisto **Carl von Linné** (1707-1778) priskribis florojn de la genro *Camellia*. Li paradokse ne uzis por sia laboro priskribojn de Kamel, sed nomigis novajn ekzotajn florojn laŭ moravia misiisto: kamelioj.

Senmorta jezuita ordeno

La ordeno estis atakita per multe da malamikon. En la jaro 1615 estis en Krakovo eldonitaj „Kaŝaj instrukcioj“ („Monita secreta“), kies aŭtoro estis eksa jezuito **Zahorowski** (1614) (eliminata el la ordeno en la jaro 1613 pro liaj disciplinaj problemoj). Fiktivaj instrukcioj, kiel oni povas helpe de religio manipuli la mondon, estis bonaj argumentoj kontraŭ jezuitoj.

La mondo en la 18-a jarcento ŝanĝiĝis kaj al multe da politikistoj jezuitoj ne plaĉis. Tial la 21-an de julio 1773 papo **Klimento la 14-a** publikis mallongan dokumenton „La Sinjoro kaj nia Savinto“ („Dominus ac Redemptor noster“),

per kiu li la Societon de Jesuo aboliciis. La jezuitoj foriris en Ruslandon kaj Pruslandon, ĉar en tiuj landoj oni la papon ne respektis. En la jaro 1814 papo **Pius la 7-a** la ordenon tutmonde renovigis.

La jezuitoj kiel viktimoj de naziaj kaj komunismaj represioj

Kelkaj nazioj estis kredantoj (katolikoj ol nekatolikoj), sed spite de tio ili persekutis kristanojn. Ankaŭ la jezuitoj fariĝis viktimoj de nazia persekvado.

Post komunisma puĉo en eksa Ĉeĥoslovakio (la 25-an de februaro 1948) komunistoj volis neniigi monaĥajn ordenojn. Tiel ili aranĝis la Agadon K. Tio estis kontraŭleĝa agado de ĉeĥoslovaka kaŝa polico. Nokte inter la 13-an kaj 14-an kaj la 27-an kaj 28-an de aprilo 1950 la policanoj atakis monaĥejojn kaj arestadis monaĥojn kaj pastrojn. En Slovakio ili eĉ pafmortigis kredantojn, kiuj volis helpi al malliberigitaj monaĥoj. Malliberigitaj eklezianoj estis (helpe de torturoj kaj drogoj) devigitaj konfesi „agojn kontraŭ socialisma reĝimo“. Poste ili estis „juĝitaj“. Punoj estis kruelaj. El multe da viktimoj mi mencias du ekzemplojn: jezuita provincialo **PhDr. František Šilhan** (1905-1985) estis juĝita por 25 jaroj de aresto; la jezuito **František Mikulášek** (1914-1993), kiu okupiĝis pri junularo, estis juĝita por 9 jaroj de aresto. Ankaŭ multe da aliaj jezuitoj estis persekutitaj.

La jezuito **Tomáš Špidlík** (1919-2010), kiu devenis el Boskovice estis moravia romkatolika pastro, jezuito, teologo kaj kardinalo (li neniam estis episkopo). En la jaro 1938 li ekstudis latinan kaj ĉeĥan lingvojn en filozofia fakultato en Brno. Kiam germanaj nazioj fermis ĉeĥajn universitatojn (1939) li la 23-an de septembro 1940 eniris en jezuita noviciato en Benešov apud Prago. En la jaroj 1942-1945 li studis en Velehrad. La 24-an de septembro 1942 li ordeniĝis. En la jaro 1951 li jam ne povis reveni hejmen. Li fariĝis profesoro de orienta teologio kaj kunlaboris kun Vatikana Radio.

La jezuitoj nuntempe

Societo de Jesuo nun havas 33 000 oficialajn membrojn. Ĉeĥa provinco havas ok ordenajn domojn. Provincialo estas ekde februaro 2013 **Josef Stuchlý**.

Societo de Jesuo estas ordeno nur por viroj, sed ekzistas similaj monaĥinaj societoj (Anglaj Virgulinoj (Congregatio Jesu), fratinoj Sacré-Coeur, Societo de Fratinoj de Jesuo.

La plej fama jezuito de la mondo estas nuntempa **papo Francisko** (1936), propranome Jorge Mario Bergoglio. La 24-an de marto 1976 oficira junto en Argentino faris puĉon kontraŭ prezidentino Isabelita Perón kaj registaro. En tuta lando oni instalas militjuĝan reĝimon. Politikaj partioj kaj societoj estis malpermesitaj, homoj estis turmentitaj aŭ senspure malaperiĝis. Milita registaro persekutis kristanojn. En tiuj kondiĉoj ĉefepiskopo de Buenos Aires, venonta papo Francisko savis multe da homoj. La reĝimo disfalis en la jaro 1983, post malvenkita milito por Falklandoj. Papo Francisko estas jezuito, tre

populara inter kredantoj. Li montras al tuta homaro, ke la Amo de Kristo savos la mondon.

Referencoj

- COOL, M. 2013: František, papež z Nového světa. 1-a eldono, Prago, Volvox Globator, 151 paĝoj.
- ČORNEJOVÁ, I. 1995: Tovaryšstvo Ježíšovo. Jezuité v Čechách. 1-a eldono, Prago, Mladá fronta, 247 paĝoj.
- FÜLÖP-MILLER, R. 2006: Moc a tajemství jezuitů. Kulturní a duchovní dějiny Tovaryšstva Ježíšova. 3-a eldono, Prago, Rybka Publishers, 654 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1994: Toulky českou minulostí, 3-a volumo, 1-a eldono, Prago, Baronet, 239 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1995: Toulky českou minulostí, 4-a volumo, 1-a eldono, Prago, Baronet, 239 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1997: Toulky českou minulostí, 6-a volumo, 1-a eldono, Prago, Baronet & Via facti, 230 paĝoj.
- JACKOVÁ, M. 2011: Divadlo jako škola ctnosti a zbožnosti. Jezuitské školské drama v Praze v první polovině 18. století- 1-a eldono, Prago, Filozofická fakulta University Karlovy, 286 paĝoj.
- KOLÁČEK, J. 2002: 200 let jezuitů v Brně. 1-a eldono, Velehrad, Refugium Velehrad Roma, s.r.o., 147 paĝoj.
- LINKA, J. 2005: Jiří Ferus-Plachý SJ a jeho okruh aneb Dílo nezáhadnějšího českého autora 17. století. – Listy filologické, 128: 1-2.
- NOVOTNÝ, J. & POLÁK, F. 2001: Tajné dějiny jezuitů. 1-a eldono, Prago, Adonai, 753 paĝoj.
- PAVLÍK, J. 2011: Vzpomínky na zemřelé jezuitu, narozené v Čechách, na Moravě a v moravském Slezsku od roku 1914. 1-a eldono, Olomouc, Centra Aletti, 798 paĝoj.
- PEKAŘ, J. 1991: Dějiny československé. 2-a eld., Prago, Agentura Tip Š, 247 paĝoj.
- SCAVO, N. 2014: Bergoliův seznam. Lidé zachránění papežem Františkem za diktatury v Argentině. 1-a eldono, Kostelní Vydří, Karmelitánské nakladatelství, 180 paĝoj.
- ŠOTOLA, J. 1990: Tovaryšstvo Ježíšovo. 2-a eld., Prago, Československý spisovatel, 384 paĝoj.
- TICHÁ, Z. 1984: Cesta starší české literatury. 1-a eldono, Prago, Pyramida, 304 paĝoj.